# Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 18-an de Marto 2024

**Ĉeestantoj (fizike):** Amri Wandel, Inbar Mor;
**(zome):** Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Gabi Zeevi.

***Protokolo** de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

## 1. Raportoj

**Mikaelo** verkis ruslingvan literaturaĵon en koncerna gazeto, tiu kiu volas legi, povos ricevi ligilon al ĝi. **Dror**: mi povas aldoni tradukilon al la ruslingva paĝo de nia retejo.

## 2. La Israela Kongreso –11/14 de Aprilo 2024 (Jehoŝua,Amri)

**Jehoŝua**: ĝis nun estas rezervitaj la jenaj ĉambro-specoj: 1 – unulita, 4-5 – dulitaj, 1 kvarlita ĉambro, kaj 5 litoj en 6-lita virina dormejo. La 1-an de Aprilo ni devas redoni la neŭzitajn ĉambrojn. Venos 6 eksterlandanoj. Pri la antaŭtagmezaj ekskursoj respondecas **Amri**. Posttagmezaj kulturaj programoj ankoraŭ ne sufiĉas! Aktivos en ili **Amri**, **Ulrich Brandenburg**, eble **Tali Wandel**, **Amir Naor** zome, **Inbar** kantos, **Moŝe Ben Porat** prelegos, eble tranoktos. Ankoraŭ estas bezonataj artaj vesperaj programeroj. **Mikaelo** povos ludigi kaj kanti. Li bezonos Esperantajn librojn kiel premiojn. Ĉu eblos preni el nia libraro, kio estas en la kelo de **Doron**? Iom antaŭ la evento ni devos publikigi la detalan programon, almenaŭ en la retejo. **Mikaelo** kompilos ĝin post la finpretigo. **Amri** jam nuligis la ekstrajn ĉambrojn de la Antaŭkongreso. Li sendos detalan programon al la 5 partoprenantoj. Ĉiuj jam antaŭpagis al ELI-konto ĉe UEA.

## 3. Israela Esperantisto 177 (Mikaelo)

**Mikaelo**: la bulteno estas preskaŭ kompleta preta, estis jam sendita al **Jehoŝua** kaj **Amri** en PDF-formo. Ĉi-foje ĝi estas 32-paĝa, unu A4 folio (4 A5 paĝoj) pli ol kutime. **Amri**: mi trovis kelkajn tajperarojn. **Gabi**: resendu al **Mikaelo** aŭ al mi ilian liston. **Mikaelo**: post tio ĝi povos sendiĝi al la presejo.

## 4. Partopreno en la Holokaŭsta Ceremonio en *Yad Vashem* (Jehoŝua)

**Jehoŝua**: ĝi okazos lundon, la 6-an de Majo, je la 10:00. Mi mendis la florkronon, kiun ni tradicie metas ĉe la monumento nome de ELI kaj UEA. Kiu nin reprezentos? **Malka Zemeli** malaperis el la Movado, **Amri** ne estos enlande. Do ni denove turnos nin al **Chaja Peer** kaj **Laurin Lewis**, espereble ili akceptos. Ni provu ankaŭ varbi ilin kaj aliajn jerusalemanojn por la IK, almenaŭ por dumtaga vizito.

## 5. Magazeno por la libroj de ELI (Ŝlomo)

**Ŝlomo**: ĉu ni akceptas lui neuzatan ĉambron en mia kibuco? **Jehoŝua**, **Gabi**: dependas de la prezo, la daŭro kaj la ebleco periode viziti ĝin. **Ŝlomo**: mi informiĝos de la respondeculo, kaj

2/…

raportos la kondiĉojn al la Estraro. Principe nur mi, kiel kibucano, povos lui kaj subskribi la kontrakton, kaj ELI devos pagi. **Amri**: **David Dotan** (iam Mager, poste Ŝamgar) postlasis al ELI (por **Jehoŝua**) ĉ. 200 librojn. Dezirante transporti ilin el Beer-Ŝeva mi kontaktis lian kunulon, heredintan la loĝejon de David; evidentiĝis, ka la testamento estas apelaciita far la familianoj de David, sekve la loĝejo estas ŝlosita ĝis la fino de la proceso.

## 6. Luigo de la Oficejo (Amri)

**Amri**: **Erez**, la administranto de la etaĝo subskribis kontrakton, laŭ kiu li devas pagi 388 NIS monate (inkluzive de VAT) ĉiun jarkvaronon; devis pagi la 1-an de Marto – sed ankoraŭ ne pagis. **Ŝlomo**, kiel kasisto, devas memorigi al li kaj informi, se estos problemoj. **Amri:** la VAT-dedukto ne aperas en la kontrakto; demandinte nian advokaton Modan mi aŭdis, ke tio estas devo de la luanto, sed la kontisto de Erez ne pretas doni propran fakturojn (קבלה עצמית). **Ŝlomo** veturis al la VAT-ofico por liberigi ELI-n de VAT depreno (עוסק פטור), tiel ke ELI povu doni fakturojn, sed mankis dokumentoj; post livero de la mankantaj dokumentoj ili tamen ne reagis. **Ŝlomo** demandos ilin denove telefone.

## 7. La Dratverejo (Amri, Jehoŝua)

a) **Amri** parolis kun **Lior Hass**: la luanto petis kaj ricevis rabaton, komence 3,300 NIS por du monatoj, poste li petis pagi 3,500 NIS anstataŭ 3,700. Ni konsentis por pliaj tri monatoj, sed ekde la 1-a de Aprilo la plena luprezo realtiĝos. **Lior Hass** ne estis preta rabatigi nin, tiel lia kurtaĝo relative pligrandiĝis (pli ol 7%). **Amri** sciigis lin per retletero, ke li memorigu la luanton ke la rabato finiĝis. Ne venis respondo, do Amri reskribos pri tio al Lior.
b) La 7-an de Aprilo okazos plia kunveno de la loĝantoj de Ĥelmit-strato pri la evakuo-konstruo. Malgraŭ la tre maltaŭga tempo **Jehoŝua** tamen partoprenos nome de ELI.

**La venonta kunsido**: (pro manko da liberaj lundoj en Aprilo k Majo kaj aliaj problemoj) lundon, **la 20-an de Majo**, je la 20h00

*Protokolis: **Gabi Zeevi***